Bv. studi la kondiĉojn dorsflanke kaj en la Dua Bulteno antaŭ ol mendi. Ĉiu kongresano devas plenigi apartan mendilon. Sendu ĝin kun la pago al Roterdamo aŭ al vialanda UK-peranto, sed ĉiam ambaŭ al la sama adreso. Pri pagmanieroj konsultu la Duan Bultenon. La mendilo kaj la pago atingu la Centran Oficejon antaŭ la 15-a de majo 2017. Mendojn sen pagoj oni ne traktas. **Ne forgesu subskribi kaj dati la mendilon.** Konservu kopion kaj portu ĝin al la Kongreso.

# MENDILO POR LA 102-a UNIVERSALA KONGRESO DE ESPERANTO
## Seulo, 22 – 29 julio 2017

Nomo: ______________________________ Kongresa numero: ____________

Retadreso: ______________________________ UEA-kodo: __ __ __ __ – __

Telefono: ____________ Fakso: ____________ Sekso: viro / virino (bv. cirkli)

Lando: ______________________________ Vegetarano: ne / jes

**LOĜADO**

Laŭ la kondiĉoj presitaj en la Dua Bulteno kaj dorsflanke de tiu ĉi mendilo, mi mendas loĝadon en la sube signita kategorio ekde la _____-a de julio (alvendato) ĝis la _____-a de julio/aŭgusto (forirdato). (La prezoj estas en eŭroj por unu nokto kaj por unu persono. Bv. cirkli la mendatajn numeron kaj kategorion.)

| | HOTELO / LOĜEJO | 1-pers. (ĉambro) | 2-lita (ĉambro) |
|---|---|---|---|
| 1a | Courtyard Seoul Namdaemun - Marriott | 145 | 82 |
| 1b | Courtyard Seoul Namdaemun - Marriott (sen matenman.) | 125 | 62 |
| 2a | Benikea Premier Hotel Dongdaemun | 77 | 44 |
| 2b | Benikea Premier Hotel Dongdaemun (sen matenmanĝo) | 68 | 34 |
| 3 | Benikea Hotel KP | | 39 |
| 4 | Benikea Hotel Flower | | 33 |
| 5 | Blessing In Seoul | | 31 |
| 6 | Hotel Unique | | 29 |
| 7 | K City Hotel | | 25 |
| 8 | K-haus Hotel | | 24 |
| 9 | CMS-INN Seoul | 27 (2-persona) | 24 (3-p.) |
| 10 | Studentaj ĉambroj (prezo por sep tranoktoj!) | | 182 |

**Bv. nepre indiki alternativajn loĝkategoriojn: 1 ____________**
**2 __________ 3 __________ .**

Mi dividos la ĉambron kun kongresano(j) ____________________
____________________, kies kongresa(j) numero(j) estas __________.

(Se vi ne havas kunĉambranon bv. nepre mendi unulitan ĉambron.

Bv. re-kontroli la kalkulon! Atentu la lastan daton: la dato de foriro!)

**A. Sumo por loĝado: ____ noktoj x _________ = EUR ________**

**ANTAŬKONGRESO**

| | | loko en 1-persona ĉ. | loko en 2-lita ĉ. |
|---|---|---|---|
| ❑ A1 | Orienta parto de Koreio | 740 | 560 |

*Por ekstraj noktoj, bv. kontakti la Kongresan Fakon de UEA.*

**B. Sumo por antaŭkongreso (A1) = EUR ________**

**POSTKONGRESO**

| | | loko en 1-persona ĉ. | loko en 2-lita ĉ. |
|---|---|---|---|
| ❑ P1 | Meza parto de Koreio | 760 | 568 |
| ❑ P2 | Okcidenta parto de Koreio | 775 | 570 |
| ❑ P3 | Busan - Jeju - Seulo (kombinebla kun P1/P2) | 680 | 620 |
| ❑ P4 | Seulo - Jeju - Seulo | 859 | 746 |

*Por ekstraj noktoj, bv. kontakti la Kongresan Fakon de UEA.*

**C. Sumo por postkongreso (P1/P2/P3/P4) = EUR ________**

**DUMKONGRESAJ EKSKURSOJ**

Mi mendas la jenajn ekskursojn laŭ la kondiĉoj en la Dua Bulteno kaj dorse de tiu ĉi mendilo: bv. indiki per cirkloj kaj kalkuli la sumon en eŭroj.

TUTTAGAJ EKSKURSOJ

| | lun 24jul | mar 25jul | mer 26jul | ĵaŭ 27jul | ven 28jul | prezo |
|---|---|---|---|---|---|---|
| E1 KSZ kaj Imjingak | – | E1 | E1 | – | – | 74 |
| E2 Folklora vilaĝo k Fortikaĵo | – | – | E2 | E2 | – | 49 |
| E3 Vilaĝo Hanok | – | – | E3 | – | – | 56 |
| E4 Buyeo – iama ĉefurbo | E4 | – | E4 | – | – | 48 |
| E5 Templo Jeondeungsa | – | – | E5 | – | E5 | 48 |
| E6 Silleuksa kaj muzeo | – | – | E6 | – | – | 49 |

DUONTAGAJ EKSKURSOJ

| | dim 23jul | lun 24jul | mar 25jul | mer 26jul | ĵaŭ 27jul | ven 28jul | prezo |
|---|---|---|---|---|---|---|---|
| D1 Gyeongbokgung | – | – | – | – | – | D1 | 28 |
| D2 Changdeokgung | – | – | D2 | – | – | – | 29 |
| D3 Dongdaemun | – | D3 | – | – | – | – | 24 |
| D4 Piediro urbomuro | – | D4 | – | – | – | – | 23 |
| D5 Botanikejo | – | – | – | – | D5 | – | 23 |
| D6 Seula Turo (vesper.) | – | – | – | D6 | – | – | 30 |
| D7 Koreaj Manĝaĵoj | – | – | – | – | D7 | – | 34 |
| D8 Nacia Muzeo | D8 | – | – | – | – | – | 28 |

**D. Sumo por dumkongresaj ekskursoj** **EUR ________**

❑ **E. Bankedo** 50 EUR **EUR ________**

❑ **F. Bankkostoj** (banko aŭ ĉeko) 10/25 EUR **EUR ________**

**RESUMO:**
A. Loĝado EUR ________
B. Antaŭkongreso EUR ________
C. Postkongreso EUR ________
D. Dumkongresaj ekskursoj EUR ________
E. Bankedo EUR ________
F. Bankkostoj EUR ________

**PAGENDA SUMO ENTUTE** **EUR ________**

❑ Mi pagas per kreditkarto n-ro ____________________
valida ĝis __________. (Bv. cirkli: Visa / Mastercard / American Express)
Visa/Mastercard-kontrolnumero (tri ciferoj, dorse de la karto) __ __ __
❑ Debetu mian UEA-konton __ __ __ __ – __ (se kredita).
❑ Mi pagas per banko / ĉeko / poŝto / alie ____________________

____________________ ____________________
Loko kaj dato Subskribo

# ĜENERALAJ KONDIĈOJ KAJ REGULOJ DE MENDOJ KAJ MALMENDOJ

**Kongresano**
1. UK akceptas mendojn nur de registritaj kongresanoj. Registrita kongresano estas konsiderata tiu kiu ricevis konfirmon pri sia aliĝo. Sur la konfirmilo estas menciitaj kongresa numero (KN) kaj UEA-kodo, kiujn oni klare indiku sur la mendilo.

**Dua Bulteno**
2. Ĉiu registrita kongresano ricevas Duan Bultenon (DB), kiu enhavas detalajn priskribojn de la mendeblaj servoj: loĝado, ekskursoj, bankedo, antaŭ- kaj post-kongresoj, k.a. ofertataj servoj.

**Priskribo de la mendataj servoj**
3. UK sin devigas liveri ĉiujn servojn laŭ la priskriboj en la DB, sed ne respondecas pri (ne)plenumo de servoj ne menciitaj tie.

**Mendilo**
4. Kongresanoj faras siajn mendojn aŭ per sendo de la presita mendilo (speciala mend-formularo en la DB) al la Centra Oficejo (CO) en Roterdamo aŭ al sia landa peranto, aŭ per la reta mendilo ĉe www.uea.org/kongresoj/mendilo.

**Bazaj informoj**
5. Sur la mendilo kongresano indikas siajn familian nomon, landon, kongresan numeron, UEA-kodon, sekson kaj eventualan vegetaranecon. De tiuj informoj dependas la ĝusteco kaj rapida trakto de la mendo. UK ne respondecas pri eventualaj mismendoj kaŭzitaj pro manko de ĝustaj informoj sur la mendilo.

**Kondiĉoj de mendoj**
6. Mendilo devas esti subskribita de la kongresano kaj havi daton de la subskribo. Per sia subskribo la kongresano akceptas la kondiĉojn priskribitajn en la DB kaj tiu ĉi regularo.
7. Ĉiu mendanto devas plenigi apartan mendilon. Oni ne akceptas mendojn por pluraj personoj sur unu mendilo.

**Pagoj**
8. Ĉiu mendo devas esti akompanata de la kompleta pago por la koncernaj mendoj. **Oni traktas la mendojn nur post la ricevo de la pago.** Kiel daton de la mendoricevo oni konsideras la daton de la ricevo de la pago. UK ne respondecas pri eventuala malfruiĝo aŭ misvojiĝo de la pagoj. **La mendiloj kaj pagoj nepre estu senditaj al la sama instanco.**

**Pagmanieroj**
9. Pri la pagmanieroj validas la instrukcioj en la DB. Al la perantoj en transpagipovaj landoj oni pagas en la nacia valuto, laŭ la tarifoj kiujn fiksas la peranto mem. Al la sumo de la kongresaj mendoj la kongresano devas aldoni ankaŭ la bankajn kostojn, depende de la transpaga maniero.

**Prezoj**
10. Ĉiuj prezoj cititaj en la DB estas en eŭroj (EUR) kaj rilatas unufojan servon por unu kongresano. Se temas pri loĝado en plurlitaj ĉambroj (dum UK aŭ dum la ekskursoj) la prezo rilatas unu personon por unu nokto.

**Limdatoj**
11. Mendiloj kaj pagoj devas atingi la CO en Roterdamo (respektive la peranton) antaŭ la 15-a de majo. Post tiu dato oni ne povas garantii plenumon de la mendoj. Post la 1-a de junio oni ne plu akceptas mendojn.

**Krompago por malfrua mendo**
12. Por la mendoj farataj post la 15-a de majo, se oni mendas hotelan loĝadon, antaŭ- aŭ post-kongresajn ekskursojn, necesas aldoni krompagon de 40 EUR. Por la ceteraj mendoj (studentaj hejmoj, aliaj ekskursoj, bankedo k.s.), se oni ne mendas hotelan loĝadon la krompago estas 20 EUR.

**Konfirmoj**
13. Kongresanoj kiuj mendas antaŭ la limdato, ricevos konfirmon de siaj mendoj kaj informon, ĉu la pago estas bonorde ricevita. La konfirmilon necesas kunporti al la kongreso.

**Nesufiĉaj pagoj**
14. Se la kvitanco montras ke oni ne pagis sufiĉe, necesas tuj pagi la diferencon. Se la ŝuldo estas malpli ol 20 EUR, oni povas pagi ĝin dum la UK.

**Malmendoj**
15. La malmendoj devas esti skribaj (ankaŭ retmesaĝoj konvenas). Por malmendoj faritaj ĝis la 15-a de aprilo oni rericevos la tutan mendosumon, minus 15 EUR por la administraj kostoj. Ĉe malmendoj antaŭ la 1-a de majo oni rericevos 50% de la mendita sumo. Ekde la 1-a de majo ne eblos repagoj.

**Loĝmendo**
16. Datoj: sur la mendilo oni nepre indiku la daton de la alveno (unua nokto en la hotelo) kaj la daton de la foriro (lasta mateno en la hotelo).

**Kunloĝantoj**
17. Se oni mendas loĝadon en plurlita ĉambro kaj ne jam havas elektita(j)n kunloĝanto(j)n, la Kongresa Administracio rajtas loĝigi la mendanton kun ajnaj aliaj kongresanoj de sama sekso, aŭ loki la mendanton en unulitan ĉambron kaj postuli krompagon pro la prezdiferenco. Ankaŭ por ĉiu nokto pasigita sola en plurlita ĉambro oni postulas prezon por tuta ĉambro. En multlitaj loĝejoj la Loĝiga Servo mem kunloĝigas la mendantojn de sama sekso kaj ne povas respondeci pri la hazardaj kunloĝantoj nek akcepti plendojn pri io ajn krom pri eventuala neplenumo de la kondiĉoj promesitaj en la Dua Bulteno.

**Reklamacioj kaj repagoj**
18. Ĉiuj reklamacioj kaj postuloj pri repagoj (ekz. pro neliveritaj servoj) devas esti faritaj skribe al la CO en Roterdamo, antaŭ la 31-a de oktobro de la koncerna kongresa jaro. Postaj repagoj ne eblos pro likvido de la kongresaj kontoj. Se eble la reklamacion oni faru jam dum la UK. La kondiĉoj por repagoj estas menciitaj en la DB.

**Ŝanĝoj de mendoj / alternativaj mendoj**
19. Se ne eblas plenumi iun el la mendoj, la Kongresa Administracio rezervos alternativajn servojn, se la kongresano indikis ilin sur la mendilo. Se ne estas indikitaj alternativoj, la Administracio kontaktos la kongresanon por konsultiĝo.

**Korespondado**
20. Pri ĉiuj aspektoj de la mendoj, samkiel pri aliaj kongresaj aferoj, oni korespondu kun la CO en Roterdamo (do ne kun LKK).

*por uzo en CO:* dato __/__/__ pago__________ saldo________+ / -